

La Progresanto

REDACTIE-
COMITÉ

G. P. DE BRUIN
G. J. DEGENKAMP
F. FAULHABER

STUDIEBLAD VAN DE BOND
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN

IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL
f 2.- per jaar; f 1.50 voor leden van F.L.E.
Postgiro 331133

W. F. KRUIT

H. KUYT
JAC LEM JR.
J. VAN SCHEEPEN
H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM. G. J. DEGENKAMP, ROELANISIRAAI 4, AMSTERDAM W

LA GRAMATIKAJ PERSONOJ

La ideoj „unua, dua kaj tria persono” ĝenerale ne kaŭzas malfacilaĵojn en Esperanto. Tio rezultas el la fakto, ke ĉiuj tri personoj, singularaj kaj pluraj, postulas unu saman verboformon. Kaj ankaŭ la distingo inter la personoj ne estas malfacila: la persono = la parolanto, 2a persono = la alparolato, 3a persono = ĉiu kaj ĉio, pri kiu (kio) oni parolas.

Tio estas logika kaj klara. Sed en la lingvo ni devas ofte distingi inter la realo kaj la logika apliko de la gramatikaj reguloj, ĉar ambaŭ ideoj ne ĉiam interkongruas. Ni montrons tion per ekzemploj:

En la frazo „vi forĝesis vian pluvombrelon” sendube la vorto „vi” estas duapersona, reale kaj gramatike. Sed, se ni celas ne la tutan grupon al kiu ni parolas, sed nur unu el tiu grupo, ni diras: „unu el vi forĝesis sian pluvombrelon”. Nun ni konstatas, ke „unu”, kvankam apartenanta reale al la alparolato, tamen gramatike fariĝis tria persono. Ni ne povas konstati tion laŭ la verba formo, ĉar ja ĉiuj personoj en Esperanto postulas „-as”; sed ni konstatas tion laŭ la postulata refleksivo „sian” anstataŭ „vian”.

Dua ekzemplo: Laŭ malmoderna skribmaniero oni skribas iom oficialan leteron en la tria persono: „la subskribinto ĝentile petas...” Sed kiu estas la subskribinto? La unua persono, almenaŭ reale, sed konvencie li ne skribas „mi petas...”, sed parolas pri si kvazaŭ pri alia persono. Gramatike li do fariĝis tria persono.

Tria ekzemplo: Se infaneto turnas sin al la patrino per la peto „ĉu

Panjo bonvolas helpi min?” ŝi kompreneble reale celas la duan personon, la alparolinton, sed gramatike ŝi uzas la formon de la tria persono. Same agas humila servistino, tur-nante sin al sia mastrino per la konvencia demando „kiam la sinjorino deziras sian teon?” Laŭreale ŝi devus diri: „Kiam *vi* deziras *vian* teon?” sed tian rektan demandon je ne permesas la „distanco”! Si do gramatike uzas la formon de la tria persono kaj konsekvence daŭrigas: „sian teon”, ne *vian*”.

Kvara ekzemplo: Al kunveno ni povas diri: „Mi petas vin esprimi viajn opiniojn”. „Vi” estas dua persono, do ankaŭ „viajn”. Sed kun iom da „konvencia distanco” ni povas diri ankaŭ: „Mi petas la gesinjorojn diri siajn opiniojn.” Reale la senco estas la sama: dua persono. Sed gramatike ni uzas la trian (*gesinjorojn*), el kio rezultas la triapersona „siajn”, ne „viajn”. Kompleta la frazo ja tekstus „mi petas la gesinjorojn, ke *ili* diru *siajn* opiniojn”.

Ni scias, ke la nederlanda pronomo „u” origine signifas „Uwe Edelheid” (via moŝto), do gramatike estas tria persono.

Laŭ tio ĝi konservis sian triapersonan verboformon (u heeft). Tamen, ni uzas la vorton en alparolo reale por la dua persono, sed jen kun dua-, jen kun triapersona verboformo (u hebt, u heeft) kaj laŭ tio eĉ konformigas la refleksivon (u hebt u vergist, laŭvorte: vi eraris *vin*, kaj: u heeft zich vergist, laŭvorte: vi eraris *sin*).

Ni nun revenu al nia unua ekzemplo, sed anstataŭigu la vorton „unu” per „kiu”: „*kiu* el vi forĝesis *sian* plu-

vombreton? Ke „kiu” kiel interogativo estas triapersona, kaj laŭ tio postulas „sian”, estas al ĉiu klare. Sed ankaŭ kiel relativo ĝi estas gramatike tria persono: „tiu el vi, *kiu* forgesis *sian* pluvombreton”. Bone atentu, ke „tiu el vi” reale estas alparolato, do dua persono, sed la vorto „tiu” restas gramatike tria persono; „kiu” rilatas al „tiu el vi”, do reale al la dua persono, sed estas gramatike tria persono, kaj konsekvence ni uzas „sian”, ne „vian”.

Nun ni plivastigu tiun ekzemplon: „*Kiu* el vi forgesis *sian* pluvombreton?” (Unu el la alparolitoj respondis, ke li forgesis.) „Do estas vi, *kiu* forgesis *sian* pluvombreton!” Ankaŭ nederlande ni dirus: „Dus u bent het, *die zijn* parapluve vergeten heeft!”

Ni supozas, ke ĝis tie ĉi neniu kontraŭas tiun ĉi rezonon. Sed la opinioj subite diferenciĝas, se ni ellasas el la lasta frazo „do estas”, do simple diras: „Vi, *kiu* forgesis *sian* pluvombreton”. Ĉu pro tiu ellaso „kiu” subite fariĝas dua persono? Nepra ne! Gramatike ĝi restas tria, malgraŭ tio, ke ĝi rilatas al la dua persono.

Kio estas la kaŭzo de tiu subita diferencigo? Jen, ĉar en la naciaj lingvoj la relativo „kiu”, se ĝi rilatas al la dua persono, postulas ankaŭ la verboformon de tiu persono kaj konsekvence ankaŭ ĝian refleksivon. Sed tio ne signifas, ke tiukaze „kiu” estas dua persono! Gramatike ĝi restas tria! Ekzistas ja diferenco inter *rilati* al kaj *esti*!

Nepra erara estas la aserto, ke apartaj vortoj estas mortaj. Vero estas, ke ili ne ĉiam estas klare difineblaj ekster la kunteksto. Sed koncerne la tri gramatikajn personojn la personaj pronomoj estas ĉiam difineblaj: „mi, ni” kaj „ci, vi” estas respektive unua kaj dua persono, kaj ĉiuj ceteraj pronomoj estas tria persono. La sola devio estas — kiel ni jam pruvis — ke oni ofte uzas trian personon por la unua kaj dua, sed gramatike ĝi tamen restas tria.

Tre malforta flanko en la rezono de kontraŭuloj estas, ke ili klopodas pravigi sin per komparoj el la naciaj lingvoj (franca, angla, nederlanda, sveda). Ni povus aldoni al tio ankaŭ la slavajn, ĉar eĉ en tiuj lingvoj la relativo, rilantanta al duapersona antecedito, postulas duapersonan verboformon. Neskribita, sed nepra leĝo por ĉiu lingvo, do ankaŭ por Esperanto, estas, ke en ĝi validu *nur*

la propraj reguloj, sed ne fremdaj!

La aserto, ke „sia” post „vi, kiu” estas slavismo, ne estas pruvebla. Certe, en la slavaj lingvoj oni uzas „sia” ankaŭ ĉe la unua kaj dua personoj, kaj eĉ Zamenhof iafaje erare uzis ĝin tia. Sed estas neĝuste menciigi kiel *tiajn* erarojn, do slavismon la zamenhofan uzon de „sia” post „vi, kiu” ĉar estas tre verŝajne, ke Zamenhof uzis „sia” el gramatika vidpunkto, do konforme al nia ĉi supra rezono. Ni menciigu du tiajn ekzemplojn el la „Psalmaro”: „Vi, kiu per Sia dekstra mano helpas la fidantojn kontraŭ la atakantoj, 17.7. Sur la dekkorda psaltero mi muzikas al Vi, *kiu* donus helpon al la reĝoj, *kiu* savas *Sian* sklavon David de danĝera glavo, 144. 10-11 (kurzivigo nia). Eĉ Kalocsay, kiu konsilas uzi tiusence „via” anstataŭ „sia”, sufiĉe singarde esprimas sian opinion pri tiu zamenhofa uzo: „Se ni konsideras, ke en tiaj okazoj Zamenhof uzis la siaformon *supozeble* sub la influo de la slavaj lingvoj...” (kurzivigo nia):

La nacialingva regulo, ke post unuaŭ duapersona antecedito „kiu” postulas ankaŭ ties verboformon, ĉe iu verkisto kondukis al stranga uzo de „vi” En „Abismoj” Jean Forge diras sur paĝo 143a: „Ho, tero!... Tero, kiu *vi* estas patrino de ĉiuj homoj.” En tiu verko troviĝas tia strangaĵo eĉ sepofoje, kaj en „Saltego trans jarmiloj” de la sama aŭtoro trifoje. La formo „kiu vi” estas sendube erara kunmetaĵo. La aŭtoro sentis, ke „kiu” post la alparolito (*Tero*) tamen restas tria persono, kaj por ke ĝi impresu kiel dua persono, li aldonis la superfluan „vi”.

Ĉu ni konkludu el ĉio ĉi supre dirita, ke „sia” estas la sola korekta formo post „vi, kiu”? Ne, niaj argumentoj nur celis pruvi la nepran korektecon de „sia” en tiaj frazoj. Sed aliaflanke ni konsideras la naciajn influojn en Esperanto tro gravaj, ol ke ni povus neglekti ilin, precipe se tia influo venas ne el unu, sed el pluraj lingvoj. Akcento de nacia influo fariĝas eĉ facila, se oni povas defendi ĝin ankaŭ el gramatika kaj logika vidpunktoj. Nu, tio estas farebla:

Se ni ne havus la refleksivajn pronomojn en Esperanto, ni ne sentus hiaton en la lingvo, sed nur foreston de precizigilo. „Si” kaj „sia” ja servas nur kiel precizigiloj. Tio signifas, ke en ĉiu frazo en kiu ni nun uzas „si” kaj „sia”, ni povus anstataŭe uzi

KIO OKAZIS IN 1949!

G. P. de Bruin

LITERATURO

(Daŭrigo)

Per la apero de la dua volumo kompletigis la verko „*Leteroj de Zamenhof*”, kolektitaj kaj komentitaj de prof G. Waringhien. Ankaŭ ĉi tiu dua volumo, kiu rilatas la batalon pro Ido (1907a-1914a), estas tre leginda kaj havas grandan historian signifon.

Novaj beletraj verkoj estas: la reeldonita unua volumo de „*Faŭsto*”, de Goethe (trad. N. Bartelmes); „*La gajaj edzinoj de Windsor*”, de Shakespeare (trad. S. A. Andrew); „*Elektitaj rakontoj*”, de Elin Pelin (Bulgario), „*La alia Ameriko*”, de Svetoslav Minkov (Bulgario) kaj „*Leteroj el mia muelilo*”, de Alphonse Daudet. Ĉi lasta verko, eldonita en Japanio, prezentas nur parton de la verko de la fama franca aŭtoro. Kompletige ni nomas ankoraŭ la jam aliloke menciitan biografion „*Roza Luksemburg*”, de la nederlanda poetino H. Roland Holst.

La originala literaturo pliriĉigis per kriminaldomaneto „*Ferio kun la morto*”, de la dana pastro K. Lindquist, per novspeca romano „*Invito al ĉielo*”, de la usona esperantisto J. D. Sayers, kaj per „*La ĝoja podio*”, nova kolekto da bonhumoraj kaj satiraj potnemoj de la Estperanta kabareda artisto Raymond Schwartz. U.E.A. eldonis sub la titolo „*Somera Universitato 1948*” la tekstojn de la prelegoj, faritaj ĉe la kongreso de Malmö. Interesaj legaĵoj; ĉu ne estus rekomendinde doni al tia verketo pli trafan titolon?

Soci-politikaj verketoj estas: „*Dokumentoj de la rezistado*”, kompilis, trad. kaj eld. H. Theobald; „*Konstitucio de la Ĉeĥoslovaka Respubliko*”, 72 paĝoj; „*Lerneja Reformo en Ĉeĥoslovakio*”, 56 paĝoj; „*Nuntempa Pollando*”, 60 paĝoj.

Por katolikoj aperis du preĝlibretoj: „*Al altaro de Dio*”, de L. Tahlmaier, kaj „*Preĝareto*”, de P.M. pastro Carolfi O.M.

Kelkaj verketoj pri lingvo kaj movado (eble parte jam aperintaj en 1948a?) estas: „*Enketo pri internacia helplingvo*” (statistiko pri Esperanto-instruado, prilaborita de la Rousseau-Instituto en Genevo); „*La Esperanto-movado. ĝia historio kaj nuna stato*”, de ir. J. R. G. Isbrücker kaj C. Stop Bowitz; „*Gvidilo tra la Esperanto-movado*” (suplemento 1936a-1948a) de G. P. de Bruin; „*Lernu Esperanton (I)*” kaj „*Komplementoj de l' substantivo*”, ambaŭ de Daniel Quarello; „*Komercaj leteroj*”, de C. A. Pruisen.

GAZETARO

La plej grava nova periodaĵo estas sendube „*Esperantologio*”, internacia revuo por lingvistiko kaj bibliografio de Esperanto. Ĝi aperos per kajeroj 48-ĝis 80-paĝoj, kaj tuta volumo kompletigos verŝajne en tri jaroj. Alia serioza noveladonaĵo estas „*Scienca Revuo*”, kiun ni jam nomis aliloke. En Aŭstrio ekaperis monata gazeto „*Monda Kuriero*”, kun artikoloj popularsciencaj, biografioj, rakontoj k.t.p., sed sen iuj rilatoj al Esperanto. Ĉu ĝi estas vivkapabla, montras la estonteco. Malnova fidelulo, la budapesta „*Literatura Mondo*”, devis ĉesigi sian aperadon. (Daŭrigota)

„li”, respektive „lia, ŝia, ĝia, ilia”. „Sia” do ne aliigas la sencon; ĝi nur precizigas. Kelkaj lingvoj havas eĉ pli da precizigaj pronomoj; la romanaj kaj slavaj ekzemple por la ina formo de „ili” (france „elles”, ĉeĥe „ony”).

Ni ne celas iel kritiki la ekziston de „si” kaj „sia”, kiuj multe utilas al ni por eviti miskomprenojn; sed aliaflanke ni neniel kontraŭas ilian neuzon, se ekzistas prava motivo por tio. Kaj tia motivo ekzistas, se ekzemple „sia” ne precizigas la sencon. En frazoj kun „vi kiu” la vorto „sia” efektive nenion precizigas. La senco kun

„via” aŭ „sia” restas la sama.

Resume ni diru:

1e „sia” en „vi, kiu konfidis al sia amiko” estas gramatike nepre korrekta;

2e. la rezono, ke „kiu” en tia frazo estas duapersona, ne estas ĝusta;

3e. pro tio la uzo de „via” en tia frazo ne estas argumento por la sub 2. nomita rezono;

4e. „via” tamen estas defendebla, sed per alia rezono: ke „sia” en tia frazo ne estas bezonata precizigilo;

5e. Ĉiu uzu laŭ sia prefero en tia frazo „sia” aŭ „via”, ne timante erari.

G. J. D.

POR KOMENCANTOJ

H.Kuijt.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam W.

DE CORRELATIEVEN. (korelativoj) Men kent in Esperanto een serie woordjes correlatieven genaamd. Men vindt een complete lijst in de meeste leerboeken (Nia Lernolibro, La Komencanto) en in het zakwoordenboekje F. L.E., waarvan pas een herdruk is verschenen.

Correlatie betekent: wederzijdse betrekking, correlatief: in wederzijdse betrekking staande. Al de woordjes, die op de lijst van correlatieven voorkomen, staan in betrekking tot elkaar. In totaal zijn er 45 stuks, gerend in 9 rijtjes van 5. Elk van deze rijtjes heeft z'n eigen karakter, allen hebben echter de beginletters met elkaar gemeen. Deze beginletters hebben bij ieder rijtje woordjes dezelfde functie te vervullen. Zo begint het eerste woordje van ieder rijtje met de letter „i”, het tweede met de letter „k” en vervolgens „t, ĉ” en „nen”. *i* betekent: onbepaald, niet nader te noemen (*nedifina*); *k* betekent: vragend (*demanda*), ook wel: betrekkelijk (*rilata*); *t* betekent: aanwijzend (*montra*); *ĉ* betekent: verzamelend (*kolektiva*); *nen* betekent ontkenkend (*nea*).

1. De correlatieven, die uitgaan op „u” zijn voornaamwoorden. Deze worden op twee manieren gebruikt: a. Zelfstandig, d.w.z. op zichzelf staande. Zij noemen dan altijd een persoon en hebben hetzelfde karakter als een zelfstandig naamwoord. Bij meervoud krijgen ze een „j” achter zich en als bepaling zonder voorzetsel een „n”.

Iu = iemand. *Jus iu eniris la ĉambro* = Zo juist kwam iemand de kamer in. *Li vidis iun en sia ĝardeno* = Hij zag iemand in zijn tuin. *Iuj ne povis sin regi* = Een (onbepaald) aantal personen kon zich niet beheersen.

Kiu = wie. *Kiu parolos la proksiman mardon?* = Wie zal a.s. Dinsdag spreken? *Kiujn vi renkontis hieraŭ?* = Welke personen hebt U gisteren ontmoet?

Tiu = die. *Tiu ne plu estas ano de nia grupo* = Die is geen lid meer van onze groep. *Ne timu tiujn; ili estas*

malfortaj. Wees niet bang voor die mensen; ze zijn zwak.

Ĉiu = een ieder, iedereen. *Ĉiu havas sian propran guston* = Ieder heeft z'n eigen smaak. *Ĉiuj entuziasmiĝis* = Allen werden enthousiast. *Ne ĉiujn vi povas inviti* = Niet allen kun je uitnodigen.

Neniu = niemand. *Neniu ankoraŭ venis* = Er is nog niemand gekomen. *Mi konas nenium en la urbo* = Ik ken niemand in de stad.

b. Bijvoeglijk, d.w.z. met betrekking tot een zelfstandig naamwoord. Zij ondergaan ook dezelfde veranderingen als het bijbehorend zelfstandig naamwoord, dus bij meervoud een „j” en als bepaling zonder voorz. een „n”. Gezien het bijvoeglijk karakter, kunnen zij niet slechts betrekking hebben op personen, maar op iedere zelfstandigheid, die door het betreffende zelfstandig naamwoord wordt genoemd. *Iu kuracisto bandagi la vundon* = D' een of andere dokter heeft de wond verbonden. *Iuj libroj jam estas venditaj* = Een (onbepaald) aantal boeken is reeds verkocht. *Iun liberan tagon mi vizitos vin.* = Op een vrije dag kom ik eens op bezoek. *De kiu grupo vi estas membro?* = Van welke groep ben je lid? *Kiu* wordt ook gebruikt als betrekkelijk voornaamwoord (*rilata pronomo*) d.i. een voornaamwoord, dat een reeds genoemde zelfstandigheid aanduidt: *La libroj, kiuj kuŝas tie, estas belegaj* = De boeken, die daar liggen, zijn prachtig. *La hundo, kiun mi ĵus aĉetis, forkuris* = De hond, die ik zo juist kocht, is weggelopen. *La viron, kiu iras tie, mi ne konas* = De man die daar gaat, ken ik niet.

Opmerking. De laatste voorbeelden moeten ieder apart ontleed worden. Als voorbeeld de laatste zin:

La viron mi ne konas (*la viron* = bepaling zonder voorzetsel, dus *n*). *Kiu iras tie* (*kiu* = onderwerp, dus geen *n*).

Tiu konstruaĵo jam estas malnova = Dat gebouw is reeds oud. *Mi ne amas tiujn homojn* = Ik houd niet van die mensen. *Mi konas ĉiujn membrojn de nia sekcio* = Ik ken alle leden van onze afdeling. *Neniu letero alvenis* = Geen enkele brief is aangekomen. *Mi vidas nenium virinon inter la ĉeestantoj* = Ik zie geen enkele vrouw onder de aanwezigen.

TER VERTALING. Opgave 4. Iemand heeft mij de weg gewezen. Kijk, er staat iemand voor de deur. Wie zou er zo laat nog komen? Ik verwacht niemand. Waar zijn de boeken, die ik je geleend heb? Het is prettig over een onderwerp te spreken, dat men geheel beheerst. Lees die boeken niet, die zo slecht zijn geschreven. Allen, die hem kennen, prijzen zijn gedrag. Een ieder, die Esperanto spreekt, heeft buitenlandse vrienden. Het huis, dat wij zo juist passeerden, is pas gebouwd. Dat boek heb ik nog niet gelezen; is het mooi?

VERTALING van opgave 2.

La kursgvidanto konsillis 1) al la kursanoj 2), bone lerni 3) siajn lecionojn. Kabe apartenas al 4) la plej bonaj tradukintoj, lia plej grava 5) traduko estas „La Faraono”, belega verko. 6) Ĉi tiu libro konsistas 7) el tri volumoj 8). Kiu forgesis sian ĉapeleon? Johano kaj lia fratino ne povis kaŝi sian ĝojon. Jansen vizitis kun sia 9) edzino la kongreson en Parizo. La viro ne vidis, ke lia 10) fileto falas 11). Kial vi ne kunportas 12) lian libron? Mi ne scias, kie 13) Johano metis 14) sian libron; se mi povus trovi ĝin, mi certe kunportus ĝin. La prezidanto detale parolis pri Zamenhof kaj liaj verkoj 15).

1) Niet: *konsolis: konsoli* = troosten.
2) Niet: *kursistoj*: met het achtervoegsel „ist” vormt men namen van personen in verband met hun werkzaamheden. 3) Ook: *ke ili bone lernu*.

4) Niet: *ĉe*; toebehoren aan = *aparteni al*. Men lere deze uitdrukking van buiten. 5) Niet: *eminenta*: dit woord gebruikt men in betrekking tot personen. *Li estas eminenta profesoro*. 6) Niet: *laboro*: d.i. arbeid, zonder meer. *Verko* = een product van geestelijke arbeid. 7) Niet: *ekzistas*: men vergelijkte: *Ne ekzistas homoj, kiuj neniam faris eraron*. *Nia korpo konsistas el ostoj, karno kaj sango*. 8. Juister dan: *partoj: volumo* = een boek in één band, bijv.: „*Originala verkaro*” *konsistas el unu volumo* (men kan niet zeggen: *el unu parto*). Zo ook: „*Leteroj de Zamenhof*” *konsistas el du volumoj*. 9) Niet: *lia*: men heeft hier met een bepaling te doen, *sia* heeft hier betrekking op het onderwerp. 11) Niet: *falis*: hier is geen sprake van een richting. 14) Niet: *kuŝis, estas kuŝanta, kuŝi* is een onovergankelijk werkwoord. Men vergelijkte: *Mi kuŝigis la libron sur la breton*. *Nun ĝi kuŝas sur la breto*. Maar: *Mi metis la libron sur la breton*. *Meti* is overgankelijk. 15) Niet: met *n*; d.i. een bepaling met voorzetsel.

Beoordeling: G. B. te Z. 9; E. H. S. te H. 9; K. S. te Z. 7; D. K. te Z. 9; G. A. te R. 9; Tilio 8; Astor 8; A. de B. te R. 5; J. R. te A. 9; O. K. 9; D. P. te A. 7; A. B. te A. 9; E. R. M. te S. 9; J. A. V. te U. 7; G. B. N. te Z. 8; G. W. W. te G. 6; P. W. te Z. 9; J. J. H. N. te D. 7; J. J. B. te D. 9; J. C. M. te Z. 9; A. A. D. te Z. 9; A. J. G. te D.

ONZE EIGEN UITGAVEN

Het elementaire leerboek geeft de leerling gelegenheid een blik te werpen op alles wat de taal bevat, maar ook slechts een blik, want bij elk taalonderdeel kan niet lang worden stilgestaan; dat zou te veel ruimte, tijd en inspanning vorderen. Bovendien zou het de beginner te veel vermoeien, hem misschien afschrikken van het vele dat de taal, ook Esperanto, te bieden heeft.

Heeft de leerling, nu esperantist, alles wat het leerboek bevat, min of meer verwerkt, dan ontwaakt bij hem de behoefte de taal meer in bijzonderheden te bestuderen. Oppervlakkige kennis bevredigt niet meer, en hij wenst een boek te bezitten, waarin alle taalonderdelen uitvoerig worden behandeld.

Dat boek is „*Tra la labirinto tra la Esperanta gramatiko*”, van F. Faulhaber, een standaardwerk, beslist onmisbaar voor elke esperantist.

Sinds enige tijd is dit belangrijke werk evenwel uitverkocht. Een nieuwe uitgave brengt grote financiële zorgen mee. Toch heeft het bestuur van F.L.E. besloten die zorgen te risikeran om weer in de dringende behoefte aan dit werk te kunnen voorzien.

De prijs is bepaald op slechts f 5.90; een uiterst lage prijs voor zulk een studiewerk. Om de uitgave mogelijk te maken is het echter nodig, dat reeds vooruit een groot aantal bestellingen kan worden genoteerd. En om dat te bereiken is een bijzondere prijs vastgesteld: f 4.90 bij vooruitbestelling. Bovendien genieten afdelingen daarbij nog 20 % korting.

De Libroservo verwacht dus, dat velen van deze welkome gelegenheid zullen profiteren. Laat uw bestelling evenwel vergezeld gaan van betaling!

DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

Jac. Lem

Zijn woorden verslinden
Vrijspreken
Als de gelegenheid zich voordoet
Zo arm als een kerkrat
Aan de lippen hangen
Warboel ontknopen
Zwendelaar
Die noch voor moeilijkheden, noch
voor gevaren uit de weg gaat
Geld, dat stom is, maakt recht, wat
krom is
Redenaar
Zich van de domme houden
De naam noemen
Bezielen
Zichzelf sparen
Betrekken (van gelaat)
De gelegenheid aangrijpen
Inhouden (van een paard)
Omgaan met
Is hier van toepassing?
Beven als een riet
Vermogend man

Opgave 3.

1. Toen ik de naam van die man noemde, betrok haar gelaat en de glimlach om haar mond ging over in een verachtelijke uitdrukking. 2. Als de gelegenheid zich voordoet, ben je dan geneigd om een functie in het bestuur van je afdeling te aanvaarden? 3. De volgende maand beginnen onze cursussen. Aarzel niet langer, maar grijp de gelegenheid aan om Esperanto te leren. 4. Niet uit nieuwsgierigheid stel ik je die vragen. Mijn enige doel is de warboel te ontknopen en je te helpen weer orde in je zaken te brengen. 5. Het is onbegrijpelijk, dat die zwendelaar zoveel mensen kon bedriegen. Velen hielden hem voor een vermogend man, maar in werkelijkheid is hij zo arm als een kerkrat. 6. Hij is iemand, die weet wat hij wil, die noch voor moeilijkheden, noch voor gevaren uit de weg gaat. Hij eist veel van anderen, maar ook zichzelf spaart hij niet. Zijn voorbeeld bezielt ieder, die met hem omgaat. 7. Zij hing aan de lippen van de spreker en verslond elk zijner woorden. Was, hetgeen de redenaar vertelde, niet haar eigen geschiedenis? 8. Toen de ruiter ons had ingehaald, hield hij zijn paard in en vroeg ons om inlichtingen. Daar wij hem echter niet vertrouwden, hielden wij ons van de domme. 9. Toen hij uit die kamer terugkwam, beefde hij als een

Kapti liajn vortojn
Deklari senkulpa
Kiam venos la okazo
Tiom malriĉa, kiom muŝo prejeĝa
Fiksi siajn okulojn sur la buŝo
Malplekti konfuzajojn
Fikomercisto
Kiun hezitas nek malfacilaĵoj, nek
danĝeroj
Al tiu ĉio cedas, kiu monon posedas

Oratoro
Ŝajnigi sin stultulo
Citi la nomon
Entuziasmigi
Sin mem indulgi
Malsereniĝi
Kapti la okazon
Ekbridi
Interrilati kun
Ĉu aplikiĝas en ĉi tiu okazo?
Tremi kiel tremolo
Bonhavulo (riĉulo)

riet. Spottend vroegen wij, of hij soms spoken had gezien. 10. Begrijp je (nu), hoe zo iemand als hij kon worden vrijgesproken? Of is hier van toepassing: geld, dat stom is, maakt recht, wat krom is?

1. Sur monteto vidiĝis la neforta (malforta) ardo de estingiĝonta fajro, kiu ĵetis ruĝan lumon sur la altkreskan figuron de iu viro. 2. Dum momento la malgajeco de lia vizaĝo cedis lokon al esprimo de espero. 3. La situacio estis eksplode streĉita. Ĉiu estis nerva kaj demandis al si: Kio estas okazonta? 4. La famo estis, ke la komunuma estraro intencas eksproprigi (malproprigi) ĉi tiujn parcelojn. 5. Kiam li asertis esti tute senkulpa kaj scii nenion, mi ne povis lippremi moka rideton. 6. Pasintan semajnon mi povis bonŝance aĉeti preskaŭ novan ekzempleron de „Plena Vortaro”. 7. Vi ne povas imagi kiom malbone estas al mi en la koro atesti kontraŭ lin. 8. Mi jam de longe elobservis vin. Ĉu vi intencas gefianĉiĝi (estas fianĉiĝontaj)? Honeste konfesu: Kiel vi estas unu kun la dua? 9. Ĉu mi kulpas, ke vi estas en embaraso? Vi ĉiam ignoras ĉiun bonan konsilon. Vi nun mem ebenigu al vi la vojon. 10. Vi ne tro alte taksu lian kapablecon; li ŝajnigas sin sperta metiisto (fakulo), sed efektive (reale) li estas ne pli ol fuŝanto.

POR PROGRESANTOJ

J. v. Scheepen

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres: Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgabe 4. Vertaal in Esperanto:
ONS ONDERWIJS

Ons onderwijs verkeert in een deplorabele toestand. De oorlog verwoestte 251 scholen met 1702 lokalen; in Rotterdam vielen op één rampzalige dag 47 schoolgebouwen met 309 lokalen in puin. En sinds de bevrijding is er niet één herbouwd (Juli 1947). Hoe zal de toestand zijn in 1952, wanneer de 50 % geboorteaanwas toelating tot de scholen vraagt?

Het grote tekort aan onderwijzers zal in de naaste toekomst groeien tot een onrustbarende hoogte. Bij de handhaving van het tegenwoordige leerlinggemiddelde (34,4) zullen er van 1946 tot en met 1952 niet minder dan 15.900 nieuwe onderwijzers nodig zijn, terwijl de maximum-capaciteit van de kweekscholen 2000 is. Deze kunnen dus hoogstens in die 6 jaar 12.000 candidaten leveren. Vergroting van het bestaande tekort alzo met 3900!

(Uit: „Het Schoolblad“.)

Vertaling van opgave 2.

LIBROJ.

Libroj povas doni veran ĝojon, ĉar 1) ili plivastigas 2) nian vivon. Se 3) obsedas nin la ĉiutagaj 4) rutin(aĉ)o kaj zorgoj, libroj povas malfermi al ni la mondon. En (la) inertplenaj tagoj ni prenos 5) librojn, kondukantajn 6) nin al malproksimaj (re)memoroj 7), en kiuj kuraĝaj maristoj hisas la velojn, en kiuj galopas ardaĵ ĉevaloj tra la stepoj, en kiuj kuraĝaj pioniroj 8) venkas dezertojn kaj paarbarojn. En (la) malgajigaj tagoj

ni deziras libron, en kiu la vera rido 9) venkas vian malgajecon 10). En (la) konfuzigaj 11) tagoj ni serĉos libron, en kiu la vivo bildiĝas klara kaj forta 12). En (la) tagoj de malĝojo ili enhavas 13) vorton pri konsolo. En (la) tagoj plenaj de demando ili enhavas respondon. Tra 14) ĉiuj ĵarcentoj 15) oni fiksis 16) en libroj serĉadon kaj deziron, la trovadon kaj perdadon, la luktheadon kaj suferadon de la homaro. Ĉu ni preteriru 17) tiun trezoron?

1) Ook: *tial ke, pro tio ke*. 2) Ook: *pliprofundigas, plilarĝigas*. 3) Ook: *kiam, tiam*. 4) Ook: *la rutino kaj zorgoj de ĉiuj tagoj*. 5) Ook tegenwoordige tijd. Niet: *kaptos*. Ook: *etendos la manon*. 6) Ook: *kiuj kondukas*. 7) Ook: *memoraĵoj*. 8) Pioniroj. Abusievelijk vermeldde de tekst piloten i.p.l.v. pioniers. 9) Ook: *humoro*. 10) Ook: *malgrandanimecon*. 11) Niet: *konfuzaj. Tagoj, kiuj igas nin konfuzaj*. 12) Mag ook de bijwoordelijke vorm hebben: *klare bildiĝas*. 13) Pli klara ol nur estas. 14) „Tra“ in dit tijdsbegrip is juist. 15) Niet: *centjaro*. Deze verouderde vorm is niet overeenkomstig de regels der woordvorming. 16) Ook: *estas fiksitaj*. 17) Ook: *ĉu ni rajtas neglekti, ignori*. „Darfi“ is niet officieel.

Beoordeling: H. J. H. te B. 9; A. J. G. te D. 8; C. J. P. te Z. 7; J. J. B. te D. 8; F. B. R. te A. 8; Kortbirde 9; D. P. te A. 6; A. P. M. L. te G. 9; J. C. M. te Z. 7; Astor 8; J. S. te H. 8; J. R. te A. 9; Fr. A. S. te H. 8; D. V. te H. 8; P. W. W. te Gr. 6; L. B.-B. te W. 8; A. A. D. te Z. 8; F. v. d. L. de V. te A. 6; E. R. M. te S. 7; G. A. te R. 8; E. A. B. te A. 8; K. Sch. te Z. 6; G. B. te Z. 8; D. K. te Z. 7.

FRAZO KAJ PROPOZICIO

Oni demandas al ni klarigon pri la diferenco inter frazo kaj propozicio.

Propozicio estas frazo aŭ parto de frazo, kiun oni povas konsideri kompleta, ĉar ĝi enhavas kernan ideon. Propozicio konsistas ĝenerale el subjekto kaj predikato kaj ofte enhavas ankaŭ komplementojn. Se iu parto mankas, oni povas ĝin subkompreni. Propozicioj do estas: *Esperanto estas facila lingvo por ĉiutaga uzado*. Ĉi estas konsiderebla ankaŭ kiel speciala scienco. Ĝi posedas ĉiujn ecojn por la plej diversa aplikado.

Ĉiu el la nomitaj propozicioj estas simpla frazo. Sed ni povas kunligi ilin en unu kunmetitan aŭ kompleksan frazon: *Esperanto estas facila lingvo por ĉiutaga uzado, sed ĝi estas konsiderebla ankaŭ kiel scienco, ĉar ĝi posedas ĉiujn ecojn por la plej diversa aplikado*. Frazo do povas konsisti el unu propozicio, sed ankaŭ el pli da propozicioj. La kunligo okazas per rilataj vortoj (*kiu, kies, kiel k.t.p.*), per konjunkcioj (*kaj, aŭ, ĉu, ke k.t.p.*) aŭ per interpunkcio (komo, punkt-komo). La finon de la frazo signas la punkto.

PRI LANDNOMOJ

Ni ne intencas tute pritrakti ĉi tŭn problemon, ĉar oni jam skribis pri tiu temo ŝufice ofte. Sed atentigo pri kelkaj specialaĵoj eble helpos la lernantojn trovi la vojon en la labirinto.

Ĉe esperantigo de propraj nomoj oni kustimas aldoni „o” en la nacia formo kaj forlasi duoblaĵn konsonantojn.

„Rotterdam” farigas „Roterdamo” k.t.p. Sed kiam ni en ekzercoj korektas „Hollando” en „Hollando” kun duobla „ll” la lernanto miras. Tamen en tiaj vortoj oni bone pripensu la formon, „Land” en la nederlanda vorto estas kvazaŭŝufikso. La radiko estas do „Hol”, sed ne „Ho”. Ĉi tiu vorto devenas verŝajne de la vorto „Holt”, kiu signifas „Hout”. Nia lando estis „Houtland”, lando provizita per arbaregoj. En Esperanto ni metas la ŝufikson „lando” malantaŭ la radikon „Hol”, kaj ni ekhavas „Hollando”, kun duobla „ll”. Ĉar la nacia nomo jam finiĝas per „land”, oni transprenis ĝin en Esperanton, sed laŭ la reguloj de nia lingvo ni rajte povus paroli pri „Holujo”, sed ĉi tiun formon oni ne renkontas, samkiel ĉe „Islando”, oni neniam diras „sujo”.

La radiko de „Finlando” respondas al tiu de la verbo „fini”. Pro tio oni ofte skribas ĝin per duobla „nn”.

Se oni esperantigas nacian nomon, ne laŭ la ortografio de ĉi ties nacia lingvo, sed laŭ ŝia propra, oni ekhavas neĝustan

formon. En unu el niaj ekzercoj oni devis traduki „Jeruzalem”. La litero „z” estas „nederlanda” skribformo. Ĝi devus esti „s”. Pro tio oni traduku „Jerusalemo”.

Kiel traduko de nia „Indiĉ” oni oftege renkontas „Hindio”. Sed „Hindio” signifas la landon, kie loĝas la „hindoj”, sekve „Angla Hindio”, la regionon en Azio. Kiam Kistoforo Kolumbo malkovris Amerikon, li opiniis esti trovinta „Indio”, la orientan insularon; pro tio oni nomis la indiĝenojn „indianoj”, t.e. anoj (loĝantoj) de Indio. Ĉi tiu vorto cetere prezentas novan malfacilaĵon. La radiko de „Indio” estas „Ind”; la loĝantoj do estus „indanoj”. Se ni prenus la radikon de „indiano” la radiko estus „Indi” kaj la landnomo „Indio”.... Ne la reguloj de Esperanto estas malfacilaj, sed la naciaj formoj, kiuj influas ilin.

La diferenco de Angla kaj Nederlanda „Indioj” estas do la litero „H”. Cetere jam aperis nova nomo „Indonezio”.

J. van Scheepen.

Ni petas niajn legantojn ne komenci diskuton pri la „ujo-io-temo”, konklude laŭ la ĉi supra traktajo. Por konservi la „landnoman pacon” ni ne okupas pozicion en tiu afero. Kaj la artikolo de k-do v. Scheepen traktas ne ĝin, sed iajn specialaĵojn. Red.

KOMPLEMENTOJ

Iu leganto demandas al ni kiel niaj Esp.-lernolibroj mencias nur komplementojn de tempo, daŭro, mezuro, prezo kaj pezo, sed silentas pri la aliaj komplementoj (de loko, kaŭzo k.c.).

Efektive, ekzistas pluraj komplementoj, i.a. lokaj (... *sur la tablo*), kaŭzaj (... *pro malsano*), koncedaj (... *malgraŭ la pluvo*), manieraj (... *per plumo*), originaj (... *el oro*), situaĵaj (... *kun ĉapelo*), celaj (... *por vivtenado*).

Mencii ilin en elementa lernolibro estus nur balasto por la lernanto, ĉar li ne bezonas diferencigi ĉiujn por lerni la gramatikon. Kial la lernolibro do tamen mencias la tempajn, daŭrajn, mezurajn komplementojn k.t.p.? Jen:

Oni povas dividi la komplementojn laŭ du manieroj: unue en 1. objektoj (voorwerpen); 2. adjektoj (bepalingen) due en 1. rektaj komplementoj

(= sen prepozicio), 2. nerektaj komplementoj (kun prepozicio).

Ĉar por la studado de Esperanto estas necese, ke la lernanto sciu, ke rekta komplemento postulas la akuzativon, kaj nerekta komplemento la nominativon, la lernolibroj prefere parolas nur pri tiuj ĉi du specoj de komplementoj.

Kelkaj komplementoj (de kaŭzo loko, kondiĉo k.t.p.) estas ĉiam nerektaj. La lernanto do ne bezonas distingi inter rektaj kaj nerektaj, ĉar tiuj komplementoj postulas ĉiam la nominativon.

La komplementoj de tempo, daŭro, mezuro, prezo, pezo tamen estas jen rektaj, jen nerektaj (*resti tutan tagon*, *resti dum tuta tago*; *ĝi kostas unu guldenon*; *ĝi kostas po unu guldeno* k.t.p.). Pro tio estas dezirinde, ke la lernanto sciu ĝuste tiujn ĉi komplementojn, sed ne la ceterajn.

